



8-6-1974

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRÁSÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 – 1182

Telefone 42-9090

70.000 – Brasília (DF)

CGC Nº
00406 504/1000-06

BOLETIM Nº 36

JUNHO-JULHO DE 1978

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

REDAÇÃO DE MARIA ALMADA



L.L.Zamenhof kaj Jayme Sampaio lia skulptisto ĵus diplomita je skulpturarto.
(Oferto de nia vic prezidantino Hersila Valverde).

SALUTON, gesamideanoj! Estu bonvenintaj! Ke via restado en Marilja iĝu agrabla al vi ĉiuj-dezirata Brazila Konsilantaro de Esperanto, tutlanda organizo por disvastigado de Esperanto en Brazilo!

VINTRO

M. Almada

La Kampon kovras kruda frost',
ĝi murdas la herbon kaj florojn.
La malvarm' penetras ĝis ost',
dum amo hejtas niajn korojn...

I-a LATINAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO EN MARILJA (SP) DE 17-22/7/78.

Alproksimiĝas la grava evento en Marilja kaj la tuta lando sin preparas por nova renkontiĝo de la esperantistaro. La plej gravaj gazetoj aperigas sciigojn pri la 1-a Latinamerika Kongreso de Esperanto.

La unuan fojon okazos, ke el la tuta Latinameriko kaj Nordameriko ĉeestas gesemideanoj la esperantan kongreson. Estas vera entuziasmo inter la anaro brazila. La programo antaŭvidita, estos riĉa kaj certe neniu forgesos tiun historian renkontiĝon, kiu ŝanĝos la marŝadon de Zamenhofa idealo en nia vasta kaj grava lando. Sendube Brazilo rolos multe pli gravan rolon en la mondo esperantista ol iam iu lando rolis en Sud-Ameriko. Jen la kialo de nia entuziasmo. La organiza komitato kune kun la turisma agentejo en Marilja fortostreĉe klopodas helpi la vizitontojn.

Krom la muzikfestivalo, teatraĵo prezentotaj flanke de nia kara BEJO (Brazila Esperanta Junulara Organizo), estos elektita fraŭlino kaj fraŭlo Esperanto.

Nia vicprezidanto kaj ĉeforganizanto Prof-ro Wilson Pereira Martins promesas lotumi esperantaĵojn, valorajn librojn kaj aliajn memoraĵojn pri la L.K.E. en Marilja inter la ĉeestontojn.

La senpaga loĝejo ankaŭ celas helpi la partoprenontojn kaj la bonaj hoteloj donos rabaton al la esperantistoj. Do, ĉio indikas, ke la vojaĝo al Marilja fariĝos neforgesebla okazintaĵo.

Estas programita speciala prelego de nia vicprezidanto D-ro Alberto Flores pri siderurgio, filmo pri Fiat fare de nia vicprezidanto Giuseppe Grattapaglia, en Esperanto.

La ĉeesto de la Prof-ro José Passini estos rimarkinda pro lia grava sukceso kaj rolo en nia movado, kiun li mem prezentos al la kongreso.

Samideano Silva Velho, ankaŭ nia vicprezidanto, organizos belegan ekspozicion pri esperantaĵoj kaj filatelio, por ornami la kongreson kaj propagan-

di Esperanton en nia lando kaj ekster ĝi.

Neniu el niaj bonaj esperantistoj trovos la kongreson neinteresa kaj certe ĉiu klopodos aperi en Marilja por grandigi kaj riĉigi la historian renkontiĝon, kiu havas mondan karakteron. Pluraj karavanoj anoncis sian alveturon al Marilja. La kongreso estos ne nur esperanta, sed amika kaj frata. Partoprenu ni do!

Ĝis la renkontiĝo en Marilja!

☆☆☆☆☆

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevus kaj dankas al sendintoj la jenajn gazetojn kum artikoloj tre interesaj pri la esperanta movado:

Informilo de SEK (SP), Tagiĝo (DF), Tabu (Ilhéus-BA), O NO.SSO, Diário de Taubaté (SP), Correio Fraterno do ABC (SP), Candeia (DF), Tribuna de Brasília (DF), Semanário (Ilhéus-BA), Diário de Bauru (SP), O Democrata (Indaiatuba-SP), ZET - Jugoslavia, Scienca Revuo (Jugoslavia), Senaciulo (Francujo) kaj S.E.K. - bulteno.

☆☆☆☆☆

NI SCIIGAS...

VOLTA REDONDA (RJ) — Nia samideano kaj vicprezidanto de BKE. D-ro Alberto Flores, organizis Esperanto-Kurson en la Filozofia-Fakultato de Volta Redonda, kiu daŭros ses monatojn, en la kadro de Brazila Konsilantaro de Esperanto.

D-ro Flores sukcesis enkonduki Esperanton en tiun gravan fakultaton post persista laborado ĉe ĝia direktoraro.

Pri tiu kurso propagandas la "Radio Siderurgica" kaj la semajna gazeto — "Opção". Afiksoj anoncis la kurson en la fakultato, — en la komercaj butikoj kaj en la urbo mem.

Li intencas utiligi la ĵus eldonitan libron "Ilustrita Metodo de Esperanto" fare de la Spiritisma Grupo EEE, Belo Horizonte (MG). Mendoj al S-ino Dalva Noronha Costa, Caixa Postal Nº 507 - Belo Horizonte (MG) - CEP 30.000. Prezo Cr\$ 100,00. Ni deziras sukceson ne nur al utiligado de la libro sed ankaŭ

pri ĝia disvendado.

SOROCABA (SP) — Laŭ la "Informilo de SEK", en tiu progresema urbo Esperanto estas nuntempe en bona evoluo. Rimarkinda estas la fakto, ke ek de kiam eklaboris la nova senlaca prezidanto de SEK, Eluizio Bueno Rodrigues, la movado kreskis.

Kvankam ankoraŭ novbakita esperantisto, s-ano Rodrigues reorganizis la klubon, eldonas la informilon kaj organizis en la 30-a de aprilo pasinta la regionan renkontiĝon de esperantistoj kune kun la San-Paŭlo Esperanto-Asocio. Tiuj bonaj ekzemploj pruvos, ke sufiĉas voli kaj ĉio estas atingebla. Ni gratulas al s-ano Rodrigues kaj deziras al sorokabanoj plenan sukceson.

BRAZILJA (FD) — La ĝenerala sekretario de BKE, s-ano Nelson Pereira de Souza, informas nin, pere de "Tagiĝo", ke li estas gvidanta diversajn kursojn en Brazilja, kaj pritraktas la akiron de tereno por konstrui la "Casa Esperanto" por sidejo de BKE kaj BEJO. La novaĵo ĝojigas nin kaj ni apogas la ideon plene kaj esperas, ke ĝi realiĝu sukcese.

Grava Novaĵo! — Ekfunkciis en Brazilja libro-servo havanta kompletan stokon, kiu povos kontentigi la plej postulemajn legantojn. La unuaj Listoj de aĉeteblaj libroj jam estas dissendataj. La prezoj estas malaltaj. La libro-servo havas naciajn kaj internaciajn librojn. Ĉiuj libroj disvendataj de UEA estas renkontataj en ĉi tiu libro-servo.

Nuntempe eĉ la Gubernio faras kampanjon pere de TV, konsilante la popolon legi pli, do ke ni legu kaj atendu la alvokon de la regantoj de Brazilo, aĉetante esperantajn librojn. Ni ne forgesu, ke ĉiu helpo al Brazilja favoros al nia U.K. en 1981. Kiu devas esti ja grandioza. Do, ni esperantistoj, legu pli kaj donacu libron. Ĝusta adreso de la Libro-Servo: — Esperanto — Asocio de Brazilja — Libro-Servo, Caixa Postal N^o 04-0406 — 70.000 Brazilja (FD).

BAURU (SP) — Ni ricevis leteron de nia s-ano Euclides Geraldís de Carvalho, prezidanto de la Baŭrua Societo de Esperanto, kaj nia vicprezidanto, sciigante

nin pri bona marŝado de la Esperanto-movado en sia ĉarma kaj progresema urbo.

Li diras en sia letero: "Mi havas la plezuron sciigi al Vi ke la Unuiĝintaj Fakultatoj de la Konsekrita Koro de Bauru (tri fakultatoj), komencis kurson de Esperanto ĉijare.

Ĝin gvidas Léa Silvia Braga de Castro Sá, katedra profesorino de tiuj samaj fakultatoj.

Tiu kurso konsistas el 15 lernantinoj kaj ne estas kurso aparta, sed apartenas al la hora ŝarĝo de la tieaj komunaj (ordinaraj) kursoj.

Por la starigo de tiu kurso multe kunlaboris Esperanto Societo de Bauru, kiu konstante kontaktiĝis kun la estraro de la Fakultatoj.

Mi sendas al vi ĵurnalon de mia urbo, kiu publikas fotografaĵon de la kurso dum unu el ĝiaj lecionoj".

SAN-PAŬLO (SP) — La San-Paŭlo-Esperanto-Asocio okazigis kunvenon en la 10-a de junio por sia Ĝenerala Ordinara Asembleo, kies programo estis la jena: 1) Tralego kaj diskuto pri la protokolo de la Ĝenerala Asembleo; 2) Elekto de nova unua sekretario por la SPEA; 3) Latinamerika Kongreso de Esperanto; 4) Lanĉo de la libro "Paroloj al Miaj Gefiloj dulingve presita, de D-ro Walter Francini; kaj 5) Ĝeneralaĵoj temoj.

Krom tio la prezidantino de SPEA, Prof-ino Elvira Fontes, nia vicprezidantino, sciigis nin pri la senĉesa organizado de kursoj kaj pri la bona preparado por la I-a Latinamerika Kongreso, fare de la Asocio. **JUIZ DE FÓRA (MG)** — Nia vicprezidanto José Passini estis invitita de "Centro de Estudos da Sociedade Unificada de Ensino Superior Augusto Motta (S.U.A.M.) de Rio de Janeiro (RJ) por fari paroladon pri Esperanto en januaro de la venonta jaro okaze de la 2-a Nacia Kongreso pri Lingvistikaj Studoj kaj Literaturo.

La fakto estas ligita al la defendita tezo pri Esperanto ĉe PUC (Pontifícia Universidade Católica), en Rio de Janeiro pri kio informis nia Bulteno 34.

En tiu ĉarma urbo aliaj esperantistoj laboremaj zorgas pri la movado kaj laŭ ilia ebleco ne lasas la internacian lingvon ma-

laperi, inter ili troviĝas la Prof-ro José Marcilio kaj s-ano Kleber Halfeld, apotekisto. Ili pritraktas la aferon ĉe Usona Kultura Asocio.

SALVADOR (BA) — Nia vicprezidanto Raymundo José Pitanga Rocha informas nin pri la agado bonega de Bahia Esperanto Asocio. Li informas pri la jeno: 1) en la monato marto pasinta D-ro José Siqueira da Rocha faris paroladon pri la vivo de Zamenhof; 2) en aprilo ĉe la Spiritista Federacio, laŭ invito, parolis Prof-ro Sergio Pastori kaj S-ino Vivaldina Caymmi pri la neceso instrui Esperanton en la lernejoj kaj ankaŭ en la industrioj kiel komunikado utila. — Finfine parolis la Prof-ro José Adson pri la Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto. Ĉeestis la kulturan kunsidon multaj personoj, kiuj ebligis novan inviton por alia kunsido kun dato ne indikita. 3) Prof-ro Henrique Knoedt, kompetenta esperantisto, eklernigis konversacian kurson, pedagogian, metodologian kaj didaktikan pri instruado de Esperanto, kiun partoprenas ĉiuj instruistoj de la Asocio kaj interesatoj; 4) La gazeto "Tribuna da Bahia" publikis unu tutan paĝon pritraktante Esperanton sub la titolo: "Ĉu solvo por iu malnova problemoj?"; 5) Estis kreita kurso por ĵurnalistoj kaj radalistoj sub la gvidado de Prof-ro Jackson Galvão; 6) Estas preparataj komisionoj por viziti lernejojn kaj entreprenojn kun la celo propagandi pri la internacia lingvo; 7) La prezidanto de la Bahiana Esperanto-Asocio, Isao Noguti, asertis al Tribuna da Bahia, kiam intervjuita, ke estas plano parte de la A.B.E. por diplomigi profesorojn pri Esperanto en universitata nivelo, laŭ interkonsento kun la Federacia Universitato de Ceará.

Ni dankas la informojn kaj deziras al karaj gesamideanoj plenan sukceson.

ILHÉUS (BA) — Nia vicprezidanto Eleus L. de Sá, prezidanto de Ilhéus Esperanto-Grupo, sendis al ni la gazetojn "Tabu" kaj "CIP-Shopping NEWS", kiuj informas pri la okazonta I-a Latinamerika Kongreso de Esperanto en Marilja. S-ano Eleus preparas karavanon de esperantistoj por partopreni la eventon.

La nova estraro de la Esperanto-Grupo de Ilhéus estas: Prez. Eleus Leonardo

de Sá, reelektita, vicprezidanto Waldir Chagas, sekretarioj Maria das Graças Alves Goes kaj Janildo Souza Gloria; kasisto Nelson Silva, reelektita; bibliotekisto Sué-li Diacui Sá, propagandisto kaj prizorganto de revuo José Ramalho Ribeiro de Souza. Pri ĉio la gazeto "Tabu" informis sur la unua paĝo. Ni gratulas al nia vicprezidanto pro lia bonega laboro.

VITORIA (ES) — Malofte ni aŭdas pri la Kapiŝaba Esperanto Asocio, sed nun plezure ni kvitancas la alvenon de iu tre interesa kaj utila libro "ENKONDUKO EN LA BAZAJN PRINCIPOJN DE LA PSIKODIAGNOZO MIOKINETIKA" de d-ro Emilio Mira y Lopez, preparita de s-ano Gilson Villas Bôas Passos, prezidanto de la Asocio.

La libro estas valora, ĉar mankas faklibroj en niaj bibliotekoj. Sekve ĝia eldono estis trafa. Interesuloj volu sin turni al: "Associação Capixaba de Esperanto", rua São Felipe 92 - Vila Rubim - CEP. 29.000 Vitória (ES).

LE HAVRE (Francujo) — El Havro ni ricevis leteron de Grupo de la Esperantistoj de la Junlarkulturdomo pritraktante la temon "Havro vojkruciĝo de la popoloj" grandan feston pri amikeco okazanta en la monato junio. Jen kion ili diras: "Ni volus montri ke preter la limoj, super la politikaj kaj religiaj ideologioj, super la rasoj kaj naciecoj povas ekzisti interkonpreneco kaj amikeco inter la homoj, kaj ke ni esperantistoj estas bone lokitaj por tion scii. Tial al ni venis la ideo ke, por tion konigi al ĉiuj, konverĝu tio okaze en Le Havre kiel eble multe da amikecaj mesaĝoj. Se vi povus skribi tiujn mesaĝojn en via lingvo (kompreneble kun la traduko en Esperanto) sur poŝtkarto, por facila kaj alloga ekspozicio. Ni estus feliĉaj por danki vin pro via kooperado (post la someraj terioj) ni sendos al vi resumon de la okazintaĵo en le Havre dum tiu manifestado. Krome la urbo premias kvindek mesaĝojn hazard-elektitajn inter la plej valoraj. Skribu do kiel plej rapide kaj petu de viaj amikoj esperantistoj aŭ ne, same agi. Ni estus feliĉaj ke asocioj aŭ grupigoj respondu ankaŭ al nia alvoko. Ni devas sukcesi! Esperanto vivas, ni provu tion al ĉiuj, kiuj ankoraŭ hezitas kunigi siajn manojn al la ĉeno de amikeco formata de ni. Sendu al:

Amikecajn Mesaĝojn, M.J.C. 2 avenue Foch - F. 76.600- Le Havre (Francujo).

RIO DE JANEIRO (RJ) — Do Professor Sylvio Malheiros, nosso estimado coidealista e incansável batalhador em prol da causa do Esperanto, recebemos xerografias das seguintes cartas que lhe foram dirigidas, reconhecendo seu trabalho de divulgação da língua internacional, feito nos seguintes estabelecimentos de ensino: Instituto Superior de Ensino "CELSO LISBOA", do Rio de Janeiro; "Prezado Professor Sylvio Malheiros, Em nome da Federação das Faculdades Celso Lisboa queremos agradecer a V.Sa. pela palestra proferida numa das turmas do nosso curso de Letras, sobre o Esperanto, língua internacional. Aproveitamos o ensejo para ressaltar o interesse com que os estudantes o ouviram, demonstrado pela grande quantidade de perguntas dirigidas a V.Sa.", etc. Em termos semelhantes a Sociedade Unificada de Ensino Superior "Augusto Motta" — Faculdades Integradas, Centro de Estudos e Pesquisas Linguísticos Literários, escreveu-lhe: "Num momento em que se observa a luta e a agressão entre os homens, traz-nos uma profunda alegria ver V.Sa. falar dos ideais do Esperanto, dando-nos oportunidade de melhor conhecer as teorias de Zamenhof. Assim este Centro e o Departamento de Letras agradece a sua presença, as suas palavras e os ensinamentos que nos trouxe". Etc. - Obrigado, Sr. Malheiros!

☆☆☆☆☆☆

Prof-ro Sylla Chaves, prezidanto de Brazil-Esperanto-Ligo, informas nin pri lia intenco realigi BEL al UEA kaj diras aliloke: "Mi kunsendas nur aldonajon 5, ĉar vi jam ricevis ĉiujn aliajn. Tie ĉi daŭras la manko de sekretaria helpo. Nun eĉ Alan forvojaĝis. Do ankoraŭ prokrastiĝas Brazila Esperantisto, kaj via bulteno dume estas tre necesa por nia movado. Denove la tri organizaĵoj bezonas havi kunvenon por decidi pri la plej efika kunagado en la nunaj malfavoraj kondiĉoj. Amike via ..."

Ni dankas la rekonon de nia laboro al rezidanto de BEL.

ARARAS (SP) — La redakcion atingis la libro "Anuário Espírita", ĝentile sendita de Instituto de Difusão Espírita, kiun ni dankas. Ĉerte ĝi estas aĉetebla en bonaj librovendejoj. Ni legis ĝin kun granda intereso kaj konsilas al ĉiuj legi ĝin. Bedaŭrinde ĝi ne estas en Esperanto, sed en nacia lingvo.

LINGVA PRIKOMENTO

D.W. — Argentino

"Li eĉ jam ne estas trovita" - Malbona frazo. Korekte: "Li eĉ ne estas trovita ankoraŭ". "Nek" - oni uzas korelativon kun alia "nek": "Restis nek unu nek la alia", oni povas uzi ĝin ankoraŭ por ligi du propoziciojn, kiam en la unua enestas negacio (ne, neniu) "ne helpas lamento nek ploro kontraŭ kreditoro", "mi me renkontis ŝin nek ŝian fratinon, mi ne parolis kun li iam, nek lin vidis", "stranga kontinento sen tero kaj bazo": Malkorekta estas la frazo kiel: "li volas aĉeti ĉevalon ĉu azenon". Anstataŭ: "aŭ": "ĉevalon aŭ azenon". Aŭ: "Diru tion jen al ŝia patro jen al ŝia patrino". - "Vizitu Antwerpen, mondhavenon kaj turisman centron". Korekte: "Vizitu Antwerpen, la modhavenon kaj turisman centron". Aŭ: "Vizitu la mondhavenon kaj turisman centron Antwerpen". "Oni persekutas la krimulon ĝis la Malproksima Oriento". Prefere: "...ĝis la Ekstrema Oriento".

"Ili faris per sia domaŭtomobilo longan ekskurson preskaŭ ĉirkaŭ la mondo". Prefere ni diru: "... per sia loĝa trenveturilo longan ekskurson preskaŭ ĉirkaŭ la mondo". "Por tiu celo oni luis la plej bonan pafiston". - Prefere: "Oni luis pafistulon". "Por eviti defalon de folioj ni decidis planti daŭrfoliajn arbojn". "Ĉesu viajn stultajn demandojn". En tiu ĉi frazo la vorto "Ĉesu" estas malĝusta. Ĝi estas ne-transitiva verbo kaj tial ni devas diri: "Ĉesigu viajn demandojn" aŭ "ĉesu demandi". "Nia societo luis tiun salonon por ĝia jarkunveno". Ĉar la societo luis la salonon por la propra jarkunveno kaj ne por la kunveno de iu alia societo, la vorto "ĝia" estas malĝusta; oni diru: "... por sia jarkunveno". "Li montris sian suprizigon eĉ ne per moviĝeto sur la vizaĝo". La tre grava vorto "ne" estas en malĝusta loko; ni diru:

"... ne montris eĉ per moviĝeto". "Per tio-
ma sumo oni povas aĉeti domon". La vor-
toj "kioma" kaj "tioma" estas rezervitaj
por montri vicon ("kioma horo estas?")
kaj pro tio estas malkorekte uzi ilin por
esprimi kvanton. Tial: "Per tia sumo" aŭ
"per tiel granda sumo" aŭ "per tiom da
mono ..." "Ŝi ĉesis sian rakonton". La vor-
to "ĉesis" estas ĉi ti ĉi malkorekte uzata;
ĝi ne estas transitiva verbo kaj tial ĝi ne
povas havi rektan komplementon kun aku-
zativo. Oni diru do: "Li ĉesigis sian rakon-
ton", aŭ "Li ĉesis rakonti" aŭ "Li ĉesis en
la rakontado", "Ili staris apud unu la alia".
La ordo de la vortoj estas malbona. Oni
devas diri: "Ili staris unu apud la alia (unu
malamikoj apud la alia malamiko). La prefikso
"re" montras: 1) Denovan venon al la loko,
de kie oni foriris, aŭ al la stato de kiu oni
deiris = returne: "Malfrue de la ĉaso reve-
nis li" anstataŭ: "Li revenis malfrue de la
ĉaso". "Oni redonas monon; la pilko resal-
tas; spegulo refetas la radiojn". Oni aĉetis
"iran" kaj "reiran" bileton. 2) Montras
ripeton = denove. "Li fovojaĝis kaj ne-
niam plu revenis". "Car li ne komprenis,
mi devis rediri la klarigon".

☆☆☆☆☆☆

NI GRATULAS

Fraŭlino Renata S. Cunha, filino de
nia estimata financa direktoro Carlos A
Siqueira da Cunha edziniĝis al S-ro Otavio
José Baptista de Siqueira, en nia ĉefurbo
Brazilja (FD).

Al juna geedza paro ni deziras feliĉon
kaj longan vivon!

☆☆☆☆☆☆

GRAVA INFORMO!

Nia vicprezidanto, ĝenerala kunordi-
ganto de la I-a Latinamerika Kongreso de
Esperanto, D-ro Braz Cosenza, ricevis de la
ĉefo de la civila kabineto de la Prezidanto
de la Respubliko la jenan telegramon:—
"Comunico foi autorizada, conforme des-
pacho publicado Diário de 17/05/78, dis-
pensa ponto funcionários públicos federais
administração direta e autarquias que com-
probadamente comparecerem I Congresso
Latino Americano de Esperanto a realizar-
se em Marília(SP), de 17 a 22 julho 1978,
observando-se Decreto 74647/74. Cordiais
saudações — Golbery do Couto e Silva —
Ministro Chefe Gabinete Civil".

Li ankaŭ sendis al ni ekzempleron de
la gazeto "O Sul Fluminense", kiu aperigis
sciigon pri la I-a Latinamerika Kongreso
de Esperanto kaj publikigis la revenon el
Eŭropo de niaj vicprezidanto D-ro Wilson
kaj edzino Denise Deslandes, ambaŭ apar-
tenantaj al estraro de Barra-Mansa Espe-
ranto Klubo. D-ro Wilson kaj edzino ha-
vis okazon viziti la tombon de Zamenhof.
Dum tiu vizito ili havis kontakton kun ge-
esperantistoj en Londono, Parizo, Kope-
nhago, Varsovio, Vieno, Romo kaj aliaj,
kaj informas, ke multaj gesamideanoj in-
tencas partopreni la Latinameran Kongreson.

☆☆☆☆

DEZIRAS KORESPONDI...

F-ino Liisa Nokka - Hameenk 14 B
28, 20500 Turku 50 - Finnlando.

S-ro F. Adams - 46j. instruisto - Boz
712, Masterton, Nov-Zelando.

F-ino Corrie Meesters - 25j. student-
ino - Eendrachtsskade, Zuid Zyde 20-309,
Groningen 8008 - Nederlando (Holanda).

F-ino Evelyn Goh - 15j. (muziko, pia-
no) - 7 Jalan Pelepah, Pasir Panjang Road
Singapura 5 - Malajizio.

S-ro Jean-Marie Verdière - 26j. - instruisto,
36 rue Désiré Simonis, 4500 Jupille Belgio.

S-ro Jean Rufer - 56j. oficisto - CH-
3000 Bern 12 Marzili - Svisio (pri parapsi-
kologio kaj religioj).

S-ro Juda Fechter - Instruas lingvojn -
Aharonovich ST. 80A, Holon-Israelo.

S-ro David G. Valecillos - Calle 79
nº 3C-72, Maracaibo - Venezuelo.

S-ro Guillermo L. Quevedo, 28j. arki-
tekto, Av. Gral. Retana 502, Cuihuahua, Meksiko.

K-bino Janne C. Rui - 13j. Ovenbak-
ken 18b, 1345 Østeras - Norvegio.

D-ro Teresa Jankowska, 48j. kuracis-
tino - Str. E. Plater, 12/14, 00669 - Var-
sovio - Pollando.

S-ro Ludoviko Erdochegyl, 63j. em fer-
voisto-H-5500 Gyomai Micsurin ut 8 Hungario.

F-ino Judia Maria Amunátegui - 22j.
studentr. - Bolonia 2, Parque de las Ave-
nidas - Madrid 28 - Hispanio.

☆☆☆☆☆☆

MONO RICEVITA

	Gr\$
De F-ino Hersila Valverde	100,00
De F.S. Almada	200,00
Tuto	300,00